



PILO-PRESS

Internacia
Informservo

Jara abonprezo

30,- GM

Eldonanto/Herausgeber:

Ludwig Pichel
Postfach 2113
D-85 Nürnberg 1
Tel. (09 11) 46 36 49; 51 42 69

N-ro 7/1974 - 15 feb 1974
Aperas ĉiusemajne

Komparo de lernunuoj en la germana kaj en Esperanto

Berlin (GDR) En 18paĝa eseo publikigita en la revuo "der esperantist 59/60-1973" profesoro d-ro Viktor Falkenhahn, konata slavisto, specialisto por pola kaj baltikaj lingvoj, membro de la Centra Laborrondo Esperanto en GDR kaj ties fakgrupo Interlingvistiko-Esperantologio, prezentis ampleksan studon pri la problemoj de monda helplingvo - Komparo de lernunuoj en la germana kaj Esperanto. En la unua parto de tiu studo la aŭtoro konstatas la fakton, ke la multlingveco bremsas la evoluon de la produktivaj fortoj. Post cito de la eblecoj raciigi la internacian lingvan komunikadon (nacia aŭ koscie kreita internacia lingvo) li donas superrigardon pri kelkaj kutimaj argumentoj ofte prezentataj de kontraŭuloj de planlingvo senbazigante ilin (2a kaj 3a partoj). En la 4a kaj 5a partoj la aŭtoro klopodas montri, ke en limigita grado estas eble matematike mezuri la facilecon (aŭ malfacilecon) de la lernado de naciaj lingvoj kompare al Esperanto (ĉe la ekzemplo de la germana lingvo). Li montras, ke tio preskaŭ ne eblas por la leksiko de la lingvoj sed ja por la ortografiaj lernunuoj (por la germana 25 kaj por Esperanto 4) kaj por la deklinacio kaj konjugacio. Komparante la deklinacion de la germana kaj Esperanto la aŭtoro donas kiel rezulton 89 lernunuojn por la germana kaj 12 por Esperanto. Sekvas komparo de la konjugacio (sen kunmetitaj verboformoj). Tie la rezulto estas por la germana 44 lernunuoj kaj por Esperanto 9. Mankas por Esperanto nur unu (amos) kaj en la germana multe pli pro la 7 Ablaut-sistemoj, t.e. historie kondiĉitaj vokalaŝanĝoj. En la 6a parto la aŭtoro tuŝas la eblecojn de la vortfarado en Esperanto, kiuj estas multe pli grandaj kaj sistemaj ol en la germana. En la 7a parto li montras, ke la komplika sintagmatiko de la germana lingvo (plena de idiotismoj) postulas treege grandajn fortostreĉojn de la lernanto (speciale eksterlanda) por lerni ĝuste uzi la diversajn parolturnojn.

En la oka parto la aŭtoro donas ekzemplojn pri idiotismoj devenantaj el senco-ŝanĝoj. La ekzemploj el la 6a kaj 7a-8a partoj montras, ke tute ne eblas mezuri la lernunuojn pro la multaj idiotismoj.

Resumante la rezultojn de la studo (9a parto) la aŭtoro konkludas, ke la matematika mezuro de la lernunuoj limiĝas je fonetiko, fonologio, ortografio, fleksio, kaj ankaŭ (ne montrita pro spacmanko) sintakso. Tiu komparo tute ne eblas por la leksiko.

La esplorita materialo montras por la germana entute 158 lernunuojn (ortografio 25, deklinacio 89, simpla konjugacio 44) kompare al Esperanto nur 25 unuojn (ortografio 4, deklinacio 12, simpla konjugacio 9). Sed kompleta esploro de tiu limigita germana materialo minimume duobligis la lernunuojn. La studo montras la superecon, rilate la facilecon de lernado, de Esperanto kompare al la germana. La multoble pli granda lernfacileco de Esperanto ne signifas malpli grandan komunikadan kapablon. La aŭtoro alvokas al pluaj seriozaj studoj tiu-direkte.

La aŭtoro, d-ro Viktor Falkenhahn, estas profesoro ĉe la Humboldt-universitato de Berlin (GDR).

Eŭropa Dokumentaro

Schoorl (NL). Je la fino de februaro 1974 aperos provnumero de "Eŭropa Dokumentaro" esperantlingva. Ĝi estas eldono de la Eŭropa Centro por Kulturo en la kadro de la Kampanjo por Eŭropa Civila Edukado. Danke al la aktiveco de la Eŭropa Esperanto Centro aperos ĉi tiu dokumentaro, kiu ĝis nun nur ekzistas en la angla kaj franca lingvoj.

La serio enhavos artikolojn pri instruaj kaj sociaj problemoj en Eŭropo. Aperos kvar 24paĝaj kajeroj jare, enhavantaj po du/tri artikoloj. La abonprezo estas 9 svisaj frankoj aŭ egalvaloro. Prov-ekzemplero estas senpage havebla ĉe Eŭropa Centro por Kulturo, 122 rue de Lausanne, CH-1202 Genevo, Svislando.

Eŭropa Movado en Nederlando

Den Haag. Post instigo de la komisiono por Eŭropa Agado, speciale de s-ro G.F. Makink, la Eŭropa Movado en Nederlando decidis eldoni sian informbultenon en Esperanto sub la titolo "Kio estas, Kion volas, Kion faras la Eŭropa Movado". Ekzempleroj estas riceveblaj ĉe la Eŭropa Movado en Nederlando, Alexanderstraat 2, Den Haag, NL-2005

La informilo konsistas el 14 hektografitaj paĝoj DIN A 4. La celo de la unuiĝo estas "la fondo de Unuiĝinta Eŭropo sur demokratia federacia bazo."

Esperanto ĉe instruista protestkunveno

Kolonjo (pp) Per granda portafiŝo "Esperanto" kaj disdonado de dek-miloj da varbiloj la Asocio de Germanaj Esperanto-Instruistoj kaj Esperanto Programita atentigis pri Esperanto dum protestkunveno en Kolonjo aranĝita de la sindikato de edukado kaj scienco, kiun partoprenis pli ol 7 000 instruistoj el tuta Federacia Respubliko Germanio la 6an de februaro 1974. Je la fino de la kunveno Hermann Behrmann kaj liaj helpantoj transdonis al federacia ministro d-ro Klaus von Dohnany Esperanto-presajojn. Laŭ informo de Hermann Behrmann la ministro dankis pro la informmaterialo kaj deziris sukceson al la Esperanto-laboro.

Mortis Georg Podlinski

Gronau(hk) Nur nun ni eksciis, ke mortis la 4an de januaro 1974 la multjara Esperanto-aktivulo Georg Podlinski post multmonata malsano. Sinjoro Podlinski dum multaj jaroj estis membro kaj delegito de UEA, membro de GEA, kies honora insigno estis transdonita al li okaze de lia 80a naskiĝtago. Kun speciala atento s-ro Podlinski ĉiam observis la laboron de junaj esperantistoj, li mem dum multaj jaroj sukcesis instruigi infanojn en la lernejo, kies direktoro li estis.

Ĝis la malsaniĝo li regule informigis pri la ekestiĝinta junulara Esperanto-grupeto en Gronau, kaj li forpasis kun la por li feliĉiga scio, ke Esperanto ne kun li mortos en Gronau.

Demando pri JUNA AMIKO

Prof. Romeo Pagliarani, Cesena, Italio, demandas: Kial vi ne propagandas plu "Juna Amiko" sur Pilo Press kaj aliaj revuoj? Estus bone ke vi daŭrigos tiun propagandon, ĉar ĝi estas la revuo la plej taŭga por komencantoj kaj lernantoj.

Respondo: De "JUNA AMIKO" aperis ĝis nun 2 numeroj, provnumero kaj n-ro 1. La revuo estas havebla ĉe Ludwig Pickel, Libroservo, D-85 Nürnberg 1, Postfach 2113. Por ĉiu ekzemplero la prezo estas 1,- GM La abonprezo por 3 numeroj estas 3,- GM.

Novaj STAFETO-eldonaĵoj

Mendu ĉe Ludwig Pickel
Libroservo
85 Nürnberg 1, Postfach
2113
Postscheckkonto
Nürnberg 819 56-851

Tri imponajn volumojn en la grandformata (16x22 cm) Belliteratura Serio sub la konata marko STAFETO prezentas al ni Juan Régulo Pérez, kun la numeroj 29 ĝis 31, kaj samtempe la numerojn 41 kaj 44 de Beletraj Kajeraj en formato 12x18 cm — vere riĉa rikolto, je kies nura ekvido devus salti la koro de ĉiu klera amiko de nia lingvo pro ĝoja ekscito. Aldoniĝas preta timo-sento, kiam oni legas en akompana letereto de tiu kuraĝa eldonisto, ke parto el la libroj kuŝas pretaj aŭ duonpretaj jam de longa tempo, sed ne venis al la merkato pro manko de laborfortoj, kaj ke — kia ironio! — internacia fenomeno kiel la kreskanta turismo al Kanariaj Insuloj minacas meti finon al STAFETO, la plej fekunda libro-produktejo de la Internacia Lingvo, forglutante la necesajn homajn laborfortojn. Tamen li eltenas ankoraŭ kaj promesas spiti la malhelpojn. Kiel longe? Supozeble tio dependas ankaŭ lomete de la respondo de tiuj, kiuj aĉetos al ne aĉetos la nun prezentatajn verkojn.

RAYMOND SCHWARTZ: ... *kun siaspeca spico!*—Prozaj kaj versaj humurajoj originalaj, plus la 20 kronikoj titolitaj *Laŭ mia ...* *ridpunkto* sinsekve aperintaj dum 20 jaroj en «Sennacieca Revuo», ĉi tiuj prezentitaj de UBERG LINS.—Kovrilo de JAN SCHAAP JR.—STAFETO: BELLITERATURA SERIO, 29.—J. RÉGULO, Eldonisto.—La Laguna. Tenerifo, 1971 [1973].—16 x 22 cm.—216 paĝoj.—Prezo: 240 pesetoj, 4.00 usonaj dolaroj (aŭ egala valoro en aliaj valutoj). **12,- GM**

ROBERTO PASSOS NOGUEIRA: *Vojo kaj vorto. Poemoj originalaj kaj tradukitaj*, kun eseo de la aŭtoro *Pri moderna poezio kaj Esperanto*.—Antaŭparolo de WILLIAM AULD.—Kovrilo de JAN SCHAAP JR.—STAFETO: BELETRAJ KAJEROJ, 41.—J. RÉGULO, Eldonisto.—La Laguna. Tenerifo, 1972 [1973].—12 x 18 cm.—111 paĝoj.—Prezo: 150 pesetoj aŭ 2.50 dolaroj: **7,50 GM**

GASTON WARINGHIEN: *Ni kaj Ĝi. Eseoj III. Pri religio kaj arto*.—Kovrilo de JAN SCHAAP JR.—STAFETO: BELLITERATURA SERIO, 30.—J. RÉGULO, Eldonisto.—La Laguna. Tenerifo, 1973 [1973].—16 x 22 cm.—347 pĝ.—Prezo: 350 pesetoj aŭ 6.00 usonaj dolaroj. **18,- GM**

BALDUR RAGNARSSON: *Esploroj. Poemj*.—Kovrilo de JAN SCHAAP JR.—STAFETO: BELETRAJ KAJEROJ, 44.—J. RÉGULO, Eldonisto.—La Laguna. Tenerifo, 1973.—12 x 18 cm.—123 pĝ.—Prezo: 150 pesetoj aŭ 2.50 usonaj dolaroj: **7,50 GM**

PÍO BAROJA: *La arbo de la sciado*.—Romano el la hispana tradukita de FERNANDO DE DIEGO.—Aŭtor-kaj verko-prezento de JUAN RÉGULO PÉREZ.—Kovrilo de JAN SCHAAP JR.—STAFETO: BELLITERATURA SERIO, 31.—J. RÉGULO, Eldonisto.—La Laguna. Tenerifo, 1973.—16 x 22 cm.—256 (4 ekstertekstaj + xx + 232) paĝoj.—Prezo: 260 pesetoj, 4.40 usonaj dolaroj aŭ egalvaloro. **13,20 GM**

Hungario, Italio kaj Jugoslavio en kiuj finiĝas la eksperimenta instruado de Esperanto en la lernejoj de tiuj landoj. Detalojn legu en la revuo "Homo kaj Kosmo", kiu regule informos pri sukcesoj atingitaj en "Sepa Kontinento". Jarabono 15 din., por eksterlando 1,70 us. dolaroj aŭ 5,50 GM. Adreso: Zvezdarnica, Opatička 22, YU-41103 Zagreb, Poŝtako 38, Jugoslavio.

Esperanto en la radio

Zagreb. Post la kutimaj novaĵoj el Jugoslavio oni povis aŭskulti radian artikolon pri "Verkado, eldonado kaj libroj" surbaze de enketado de Verkista Asocio de Kroatio. Montriĝas, ke la 300 kroataj verkistoj havas similajn problemojn kiel la esperantistaj verkistoj.

Berno. D-ro A. Baur analizis la sekvojn de la inflacio por la svisa ekonomio, kiu estas tre interplektita kun la monda ekonomio pro la eksporto kaj importoj. — Ges-roj Gacond informis pri la "studoj" de Kultura Centro Esperantista, eldonitaj en limigita kvanto.

Varsovio. La unuan premion por la plej interesa letereto en la monato januaro ricevis Otto Walder, Romanshorn. Dum januaro la Esperanto-redakcio ricevis 206 korespondaĵojn. Je la pinto de la okcidentaj landoj staras Britio kun 26 korespondaĵoj, poste sekvas Francio (22) kaj FRG (20). El Sovetunio venis 52 korespondaĵoj. Inter la korespondantoj estis 22 novaj aŭskultantoj. El la Esperanto-Ekspreso menciindas intervjuo kun G. Silfer pri renkontiĝoj kun pola kulturo kaj A. Tomecki, la Varsovia E-trubadoro, kiu "planas, revas kaj atendas invitojn".

La Sepa Kontinento

El kopio de artikolo de Franjo Vokoun, membro de Preparkomitato por la renkontiĝo de glernantoj en la "Sepa Kontinento", kiu afable disponigis al ni la redakcio de "Homo kaj Kosmo" kaj kiu aperos en n-ro 3/1973 de tiu revuo, ni sciigas pri konfirmita interkonsento inter la Komisiono por instruado de Esperanto en la lernejoj kaj la Jugoslavia Komitato de la "Sepa Kontinento", ke okaze de la lerneja jarfino 1974 renkontiĝu sur insulo Kakan la lernantoj el kvin landoj (Aŭstrio, Bulgario,

Unua Konkurso de la Pola Radio en 1974

- 10-taga ekskurso tra Pollando
- multaj premioj kaj memordonacoj

en enketo de la Pola Radio, anoncita por la eksterlandaj aŭskultantoj.

Al partopreno en la lotado de la premioj rajtigas respondo almenaŭ al unu el la jenaj demandoj:

1. Kiujn internaciajn iniciatojn de Pollando vi opinias speciale gravaj kaj kial?
2. Kiuj problemoj estantaj objekto de la debatoj de la Konferenco pri la eŭropaj sekureco kaj kunlaboro plej multe interesas vin?
3. Kiuj elsendoj de la Pola Radio en la periodo januaro — februaro 1974, laŭ via opinio, plej interese prezentis la bildon de la nuntempa Pollando?

La respondojn ni petas sendi al la adreso: Pola Radio, PL-00-950 Warszawa, P.O. Box 46, Pollando — en kovertoj signitaj per la devizo: „Konkurso“, ĝis la 15a de marto 1974 (decidas la dato de la poŝta stampo).

La rezultoj de la konkurso estos anoncitaj en niaj disaŭdigoj la 16an de aprilo 1974. La ekskurso de la laŭreatoj de la ĉefaj premioj okazos en periodo indikota de la Pola Radio.

Partoprenu mem kaj partoprenigu aliajn. Ni deziras al vi bonŝancon!

Pola Radio

La gastmikrofono de la Esperanto-elsendoj de Pola Radio atendas la 17-an laŭreaton!

Aŭskultado al la Esperanto-elsendoj plifaciligas la respondadon al la supraĵ demandoj.

Radio Varsovio ĉiutage disaŭdigas en la internacia lingvo du programojn:

6,00 h - ondolongoj 41 m, 49 m, 200 m
16,30 h - ondolongoj 31 m, 41 m